

VESPERTO



LITERATURA FOLIO

Numero:217 .
Junio 2010. 18-a jarkolekto

Redaktanto:

Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto
Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Intervjuo kun somero

-Estimata sinjoro Somero! Mi dankas, ke Vi akceptis min, kaj Vi respondos al kelkaj demandoj miaj.

-Kompreneble tre volonte.

-Ĉi jare Vi alvenis iomete malfrue kun multe da pluvo. Kio estas ĝia kaŭzo?

-Ho, tio dependas de multaj aferoj. Tie supre oni decidis nun tiel. La antaŭaj someroj ĉiam estis tro varmegaj kaj sekaj. Nun miaj superuloj antaŭsendis mian kaprican koleginon Tempesto.

-Jes mi komprenas. Bonvolu diri al mi, kion ni atendu de la nuna somero? Certe Vi scias, ni geesperantistoj tre ŝatas vojaĝadi precipe en la someraj monatoj kaj grandparte en tiu ĉi sezono okazas Esperanto kongresoj kaj diversaj renkontiĝoj.

-Tion mi bone scias kaj mi konfesas al vi, mi simpatias je la ideo de via movado. Ni ne forgesu, ankaŭ la sunradioj egalrajte karesadas ĉiun sur la terglobo, kaj mi jam delonge deziras komunan lingvon, per kio la homaro komprenas unu la alian.

-Grandioze! Ĉu Vi kredas, ke nia amata Esperanto fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro?

-Estus tre laŭdirinde, sed tio dependas nur de vi, homoj. Klopodu, ke la zamenhofa lingvo disvastiĝu en ĉiu lando kaj kontinento! Ne forgesu, mi montros al vi la vojon!

-Redaktanto-



Internacia amo

Antaŭ nelonge mi babiladis kun mia amiko kaj li demandis: ĉu ekzistas sincera, internacia amo?

-Pri kio oni pensas? – mi demandis mire.

-Laŭ mi certe ĝi povas ekzisti – mi respondis, sed poste ankaŭ mi ekmeditis.

Kia estas la vera internacia amo? Mi ekprovis imagi kiam du diverslingvaj homoj renkontiĝas kaj enamiĝas unu al la alia. Kio okazas, se ili ne havas pontolingvon kaj ne povas komuniki.

Ili nur rigardas unu la alian. Eble en ili flagras la flamo de la amo. Sed kiel diri tion? Kiel esprimi la internajn sentojn?

Iu diras, oni komprenas la lingvon de la animo, ĉar ĝi estas universala. Tiam oni ne devas paroli, uzi iun homan lingvon. Ia neaŭdebla sonondo ŝvebas en la aero kaj la geamantoj ankaŭ sen vortoj komprenas unu la alian.

Ĝi estas la lingvo de la amo. Ĝi devenas el la koroj. Sed ĝin komprenas nur tiuj homoj, kiuj tre amas unu la alian.

Kiu mensogas la amon, tiu neniam ekaŭdos tiun ĉi belegan lingvon.

Komence ĝi helpas superi ĉiun malfacilaĵon kaj donas forton kaj persiston.

La internacia amo ne ĉiam estas feliĉa, ĉar la tempo kaj distanco, kiel rabobesto tie kaŝasadas pereigi tiujn grandiozajn sentojn.

-Ŝaŝa-

Poezio AMO

laŭ ĉinesko Chaitoufeng

Dolĉa am',
juna flam'
lulis nin feliĉa gam'.

Ni ja tre
dubis ke
kiuj folis
pli ol ni ge?

Ne,
ne,
ne!

Kurta am'
pasis jam.
Estingiĝis juna flam'.

Min ja tre
ĝenis ke
10

ĉio igis
morta pase'.

Ve,
ve,
ve!

HUMURO



Ĉu vi scias, ili parolas ankaŭ Esperanton?

Kripligita homo

(Memorante je la 4-a de junio 1920)

Iam vivis tre forta viro. Liajn muskulojn oni admiris, ĉar ili erektis pro la forto. Li vivis feliĉe kun siaj familianoj en admirinda domo.

Li ne pensis, ke tiu ĉi feliĉa vivo iutage finiĝos, kaj la belaj sonĝoj forflugos.

Okazis iutage, tiun ĉi viron malbonaj homoj trompis promesante al li ĉion bonon, se li kune batalos kontraŭ fremduloj. Ili fabrikis kredeblan ideologion pri la estonta milito.

La viro kredis ilin, kaj heroe batalis. Li ofertis sian valoran sangon.

Bedaŭrinde malgraŭ la heroa lukto kaj klopodo la milito estis perdita. La amikoj diskuris, nur li restis antaŭ la tribunalo kaj atendis la finon de la proceso. Li esperis, la sinjoro juĝisto estos justa kaj li lasos foriri la viron.

Sed ve! La juĝdecido estis kruela. Oni decidis: la viro estu kripligita kaj li devu pagi multe da oroj al la venkintoj.

Vane li protestis, preĝis al Dio, la juĝdecido estis plenumita.

Liaj brakoj kaj piedoj estis detranĉitaj. Li apenaŭ povis ekmovi. Stratangule li sidaĉis kaj atendis la mondonacojn de la preterirantoj.

Li ege hontis. Tage kaj nokte cerbumis, kiel plifaciligi la vivon. Kion fari por kel li ne devu atendi la mondonacojn.

Per streĉita forto li ellernis fari ĉion per siaj buŝo kaj la restintaj membroj.

Komence ĉio estis tre malfacila kaj laciga. Tamen fine je la miro de la homoj li superis la malfacilaĵojn kaj li vivis preskaŭ tiel, kiel aliuloj, kies ne mankas korpomembroj.

De tempo al tempo li fortiĝis kaj li kredis je miraklo, ke iutage li rericivos la perditajn membrojn de sia korpo.

Li eluzis ĉiun eblon por ricevi ilin. Li esperis, Dio ekaŭdos siajn preĝojn kaj la malnovaj vundoj cikatriĝos kaj la vivo denove estos belega, kiel antaŭe.

La viro atendas kaj atendas dume li montras al la mondo sian forton kaj persistecon.

Li sentis, iutage oni agnoskos la teruran juĝistan eraron.

Ho. Dio venu jam tiu tago!

Li preĝas ĉiutage kaj ankaŭ ni preĝu kun li, ke la lia deziro realiĝu!

-Apáti Kovács Béla-

(Antaŭ 90 jaroj en Trianon Francio post la unua mondmilito la venkantaj landoj perforte subskribigis la pacodekretan kun hungaroj. Post tiu ĉi honta evento Hungario estis distranĉita, kripligita.)

Kelkaj fotoj en tiu ĉi temo



Esperable tiuj ĉi fotoj montris al vi, kio okazis en Karpata baseno la 20-an de junio 1920.

JUSTECON AL HUNGARIO!

Por infanoj

Knabeto kaj knabineto

Iutage la knabeto ludis kun siaj amikoj. Neatendite ekaperis la knabineto. Ŝi ridetante proksimiĝis al ili.

-Kion vi deziras? – demandis la knaboj – Via patro malpermesis ludi kun ni, ĉar ni estas malriĉaj.

La knabineto ekhontis. Ŝia vango ruĝiĝis kaj ĝuste volis foriri, kiam la knabeto turnis sin al ŝi:

-Ne foriru! Restu kun ni! Por sincera amikeco ne estas bezonata mono. Mi volonte ludos kun vi. Ni fariĝu geamikoj!

Ekde tiu ĉi momento ili fariĝis geamikoj. Kiam la knabineto povis veni, ili kune ludis.

La drakona patro sciis pri ilia romanco nenion. Li pensis sia filinjo ĉiufoje vizitas prenecojn en la urbo.

La du geknaboj pasigis la tempon feliĉe. Tio estis vera infanamo. Iliaj pensoj estis sinceraj kaj puraj.

Sed ĉio finiĝas iutage. Forpasis la sunriĉa somero, kaj la familio de la knabineto translokiĝis al alia urbo fore de la nuna loĝloko.

Ili ne povis adiaŭi unu de la alia kaj plurfoje ili ne renkontiĝis ĝis plenkreskaĝo, kiam ili ambaŭ havis jam familion.

Ekvidante unu la alian ili ekridetis. En kafejo ili longe babiladis pri la forpasintaj, admirindaj jaroj.

Ili bone sciis, tiu belega epoko jam neniam revenos. Tiu bela somero restis nur memoro, kio dolĉigas la ĉiutagan vivon.

Ho se, povintus reveni la infanaĝo! Eble tiam nun ĉio okazus alimaniere.

Fino



-Onklo Adalberto-